

INFORMA

bulteno

DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

JULIO - OKTOBRO 1964

Numero 6 /68/

20 JAROJ

Proksime de Nĕmecká /slovaka vilaĝo en Tatra-montaro/ altiĝas monumento, unu el 800 monumentoj kaj memorŝtonoj, kiuj en Slovakio memorigas heroecon de popolo. Tiu ĉi popolo en lastaj tagoj de aŭgusto 1944 ekribelis kontraŭ la tiama klerial-faŝisma reĝimo. Pli ol du monatojn batalis ribelaj taĉmentoj kune kun rusoj, francoj, jugoslavoĵ, ĉeĥoj, poloj, angloj eĉ germanoj kontraŭ milita kaj teknika superforto de SS-grupoj kaj specialaj taĉmentoj de Hitler-armeo. Post tiuj du monatoj de heroaj bataloj retiriĝis la ribeluloj en slovakajn montaojn, el kiuj ili daŭrigis sian liberigan batalon, celantan al reliberigo de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Miloj da virinoj, infanoj, soldatoj kaj partiznoj perdis en slovakaj montaroj sian vivon — ilia ofero ne estis vana. Libera Ĉeĥoslovakio ekfloris en feliĉajn tagojn de sia estonteco.

EL NIA KLUBA LABORO

Ek de la 1-a de januaro 1964 ĝis la 31-a de julio 1964 okazis 31 kunvenoj, kiujn partoprenis 1564 geklubanoj av. 49,9%. La programoj de klubaj kunvenoj estis riĉaj kaj jam la 10-an de januaro prelegis en nia rondo samideano Eskil Svane, la I-a sekretario de la Heĝa dana ambasadorejo en Praha. Dum la eksterordinara klubakunveno, la 17-an de junio, prelegis en klubejo Merkur ges-anoj Laurie, kiuj alportis salutleteron de la urbestro de angla Bournemouth al la urbestro de Praha /"I.B." 5/64/.

En kunlaboro kun "Praha-a Mozart-socio" efektiviĝis la 21-an de junio en Praha-a somerdomo Bertramka kocerto el la verkoj de W. A. Mozart.

En nia klubejo ni bonvenigis multajn eksterlandajn gastojn /43/, kun aliaj eksterlandaj gesamideanoj ni renkontigis aliloke, ĉar ili vizitis nian ĉefurbon kiam ne okazis klubakunveno /115/. Pri celoj de nia klubalaboro ni informis nian legantaron en la pasinta numero de "I.B.", sed bedaŭrinde ni devas konstati, ke ankaŭ hodiaŭ restas demandoj, en kiu ejo okazos la E-ekspozicio, ĉar pri ĝi zorgas OKD-1.

Malgranda statistiko:

Kvaronjaro	Kunvenoj	partoprenintoj	averaĝo	eksterlandanoj
I-IV	13	657	50,5	10
II-IV	13	684	52,6	17
VII/1964	5	205	41,0	16
1.1.-31.7.	31	1546	49,8	43
				+115

GESAMIDEANOJ

vizitis nin el:

Anglujo 2 Bulgarujo 1 Danlando 2 Francujo 1 GDH 8 Hungarujo 6 Israelo 2 Nederlando 1 Norvegujo 2 Pollando 1 Rumanujo 3 Svedujo 5

Ek de la 19-a de septembro ne plu estos necesaj renkontiĝoj kun ekstelantaj gastoj en kafejoj ktp., se ili vizitos Praha-n en aliaj tagoj ol vendrede, kiam okazas kunveno en Řeznická str.17. Je nia dispozo estas klubejo en la str. U Obecního domu en Praha 1, kaj ĉiuvespere vi telefonu: 616-74.

La kvina Esperantista Renkontiĝo en Poděbrady

okazis en kadro de festoj de 500-jara datreveno de Paca kontrakto, kiun proponis ĉeĥa reĝo Georgo de Poděbrady en la jaro 1464.

Esperantista klubo en Poděbrady sukcesis por du tagoj /la 6-a kaj la 7-a de junio 1964/ kunvenigi pli ol 130 gesamideanojn el ĉiuj partoj de Ĉeĥoslovakio. Partopreno de du polinoj kaj unu hungara samideano donis al la renkontiĝo internacian karakteron.

Sabate, la 6-an de junio post komuna vespermanĝo, sub lerta gvidado de vic-prezidanto de Esperantista klubo en Praha s-ano A.Slanina, okazis kultura programo, en kiu la multnombraj esperantistaron salutis reprezentanto de Loka nacia komitato. Ne mankis eĉ riĉhava tombolo, muziko kaj danco. Estis agrabla amuzo aŭranta ĝis malfruaj noktaj horoj. Sekvis disiro por necesa ripozo kaj dormo. Ĉi tie mi devas esprimi mian veran surprizon kaj laŭdi la lertecon de lokaj esperantistoj kaj esperantistinoj, kiuj en plena banloka sezono kapablis en Poděbrady loĝigi preskaŭ 150 pliajn gastojn! Tion similan ni en Praha apenaŭ sukcesus fari.


Venontan tagon, dimanĉe la 7-an de junio, antaŭtagmeze okazis komuna vizito al la ekspozicio, kie ni povis admiri multajn dokumentojn kaj klarigojn pri tio, ke jam antaŭ 500 jaroj ĉeĥa reĝo Georgo en sia TRACTATUS PACIS proponis al la kristanaj popoloj tion, kion la homaro efektivas nur nun post 5 jarcentoj, post multaj bataloj kaj du teruraj mondmilitoj: Kondamno de la militoj kaj sekurigo de la paco sur la Tero. UNESCO rekonis la gravecon de tiu historia porpaca klopodado de ĉeĥa reĝo Georgo de Poděbrady, kaj rememoron pri li en vicigis en ĉi tiu. La motorŝipo ornamita per granda verda stelo, havis super la ferdeko grandan standardon kun la surskribo: "Por la amikeco inter la popoloj". La ŝipo veturis kontraŭ la fluo de la rivero Labe. La regionon kovras ĉi tie granda foliarbaro, en kiu surŝipa veturo estis vere tre agrabla. Preterpasinte kunfluon de la riveroj Labe kaj Cidlina ni balaŭ elŝipiĝis en Oseček, kie en tre agrabla foliarba medio, sur verga herbejo daŭrigis la renkontiĝo ĝis vespero. Programo ne mankis, male, ĝi eĉ abundis. Multaj estis alparoloj de diversaj ĉeestantoj, recitado, kantado kaj alia amuza programo. Ekspozicieto de ĉiuj libro-eldonaĝoj de Stafeto sur Kanariaj Insuloj, improvizite aranĝita sur herbeja deklivo altiris multajn admirantojn. Ne mankis aĉetemoj! Bedaŭrinde ne estis eble kontentigi ilin, ĉar havigi tiajn librojn ne estas afero facila. Mi bedaŭras, ke mian parolon pri tiuj libroj mi devis limigi je nuraj klarigoj pro manko de tempo al mi disponigita.

La aranĝo de ĉijara renkontiĝo estis vere tre sukcesa. Renkontiĝis malnovaj gekonatuloj el tre multaj lokoj, alvenis novaj gesamideanoj ĝis nun nur malmulte al ni konataj. Okazis longaj amikaj interparoloj, diskutoj, senfina babilado. Oni banis sin en Labe, ripozis sur freŝa herbejo, sunumis sin kaj ĝenerale tre laŭdis la aranĝon. Al samideanoj Pytloun kaj Fiala, kaj al ĉiuj iliaj helpantoj elkoran dankon kaj ĝis la revido!

Jaroslav Šustr

Matto Grosso – Hindujo – Akonkagvo – Fuji – Nepalo – Kilimanĝaro – Tatro

Li naskiĝis en ĉeĥoslovakio sub Tatra - montaro. Kun la gepatroj li translokiĝis en Jugoslavion, kie li licenciatiĝis pri juro, dediĉis sin al pentrado, skulptado, filozofio, lingvoj kaj ĵurnalismo. Kiel filma dramaturgo li denove revenis (Ĉeĥoslovakion /Filma studio Barrandov/ kaj post elmigro al Argentino li mem ne povas diri, ĉu iu lando estas lia vera patrujo. Li fariĝis naturamanta



vojaĝanto, kiu estis hejme en Matto Grosso, en Patagonio, Bolivio, Gvatemalo, en praarbaroj de Amazonio, same kiel sur pinto de Akonkagvo, aŭ en Hindujo, Nepalo, ie en apudeco de Granda ĉina muro, aŭ sub sakuroj florantaj sur montopiedo de Fuji, aŭ ie sur la rivero Hilo, aŭ sur la pinto de Kilimanĝaro, ĉie, kie li estas hejme, tie flirtas verda flago, kiun li tien alportis. Skribi al li estas facila afero, sed koni lian sam-tempan adreson estas la afero tre malfacila. Nur hazarde mi renkontis lin en la rapidvagonaro Vieno-Varsvio kaj denove hazarde ĉi-jare en Praha.

Eminenta sciencisto, prezidanto de Internacia Geografia Asocio, reprezentanta de UEA en UNESCO, membro de Brita Reĝa Geografia Societo, portanto de ordeno "Ora Kondoro" (argentina registara ordeno), tio estas li, modesta, nelacigebla scienca kaj esperanta laboranto, Licenciato Tibor Sekelj. Liaj laborlingvoj estas serbo-kroata, hispana kaj Esperanto. Tial ni povis legi liajn verkojn "Tempesto super Akonkagvo", "Tra lando de indianoj", "Kie la civilizacio ĉesas", "Vojaĝo ekster la tempo", "Kumeuaua, filo de laĝangalo", "La konkero de la montoj", "Nepalo malfermas la pordon" kaj multajn raportaĵojn en esperantaj originaloj. Liaj libroj estis tradukitaj en multajn lingvojn, ili alportis al la legantaro novajn sciencajn ekonojn, la legantaron konatiĝis kun multaj landoj aŭ partoj de nia terglobo, kie antaŭ Sekelj ne staris homa piedo. En profundaj praarbaroj de Amazonio, proksime de fontoj de misteroplena rivero Xingú, fluas tra densa ĝangalo rivero Tibor. Jes, "Rio Tibor" ricevis sian nomon laŭ Tibor Sekelj, kiu kiel unua blankulo staris sur ĝis bordo – stur teritorio de Ĥavantoj, kiuj apartenas al tribo de danĝeraj praarbaraj indiĝenoj.

Granda estas fake-sciencia laboro de Sekelj, ne pli malgranda estas tiu verkista kaj ĵurnalista. Por ni estas grava lia laboro poresperanta. Fariĝis por li kutimo alveni al loko aŭ lando, kie ne ekzistis E-movado, kaj tie krei interesiĝon, gvidi E-kursojn kaj fondi societojn aŭ asociojn. De post la jaro 1946 li estas komitatano de UEA kaj li reprezentis UEA en la UNESCO-konferencoj en jaroj 1956 kaj 1958, vojaĝis tra Azio kiel speciala sendito de UEA por esplori la eblecojn de Esperanto en tiu ĉi kontinentoj kaj ĉe tiu okazo li starigis movadon en Hindujo kaj Nepalo. Krome li fondis APO-n /Agado en Proksima Oriento/ - por pionira laboro en aziaj kaj afrikaj landoj. Sekelj estas konata kontribuanto de pluraj E-revuoj kaj konata preleganto.

Tibor Sekelj prelegis la 21-an de aŭgusto en nia klubo kaj la sekvantan tagon ni interbabilis kun li en faka rondo.

La redakcio de "I.B." esperas ricevi de li kontribuon pri liaj sciencaj kaj poresperantaj laborplanoj, kiun eble jam baldaŭ ni represos por nia legantaro.

Rf

*Ree en Ĉeĥoslovakio, lando, en kiu mi naskiĝis,
elkore mi salutas la gesamideanojn de tiu ĉi urbo
Praha, de la lando, kaj de la mondo.*

21.8.1964 Tibor Sekelj

*Ree en Ĉeĥoslovakio,
lando en kiu mi
naskiĝis, elkore mi
salutas la gesamide-
anojn de tiu ĉi urbo
Praha, de la lando,
kaj de la mondo.
21. 8. 1964. Tibor Sekelj --*

Praktiku ankaŭ

Preskaŭ nerimarkite, paŝo post paŝo, elkreskis bela amikeco inter membroj de nia Esperantista klubo en Praha kaj Esperantista grupo en Bystrzyca Klodska, Pollando. Ĉio okazis modeste, sen granda bruoj kaj oficialaj paroloj. Tial ne ciuj membroj scias multon pri ĝi. Ilin informi estas tasko de tiu ĉi artikolo.

Estas konate, ke esperantistoj en najbara Pollando atingis multajn brlajn sukcesojn dum lastaj jaroj. Prezidantino de la menciita grupeto iam vizitis nian klubon kaj entuziasme

parolis pri laboro de polaj samideanoj kaj pri ebleco de kunlaboro. Ŝi forveturis, leterado inter Praha kaj Bystrzyoa densiĝis kaj jam post nelonge unuaj kvar prahanoj veturis al Bystrzyoa por partopreni solenan fermon de Esperanto-kursoj. Per kora akcepto, eminenta bankedo kaj amuzo en granda salono de muziklernejo estis komencitaj ĉarmaj tagoj por la gastoj el Ĉeĥoslovakio, superantaj ĉiujn atendojn. Oni konstatis, ke poloj scias esti atentemaj, zorgemaj, oferemaj kaj perfektaj gastigantoj.

Naskiĝis novaj personaj amikecoj kaj kiam pasis kvaronjaro, veturis sesmembra grupeto de polaj esperantistoj al Praha, kie ili travivis impresoriĉan semajnon.

Reciprokaj vizitoj de unuopuloj kaj grupoj fariĝis de tiu tempo kutimo. Multaj bystrzycanoj vizitis jam nian ĉefurbon, rigardis belajn vidindaĵojn de Praha kaj konatiĝis kun ĝia historio. Plej oftaj celoj de polaj ekskursoj estis la kastelo Hradčany, mauzoleo sur la monto Vítkov, Nacia teatro, literatura muzeo Strahov, Malnova urbo, malnova urbodomo kun astronomia horloĝo, Nacia muzeo, teatro de Smetana, supro de la turo Prašná brána, la monto Petřín, konata preĝejo Loreta kun altvaloraj elmontraĵoj, fama Laterna Magica kaj konata restoraio "U kalicha", kiun vizitadis ĉeĥa verkisto Jaroslav Hašek, aŭtoro de "Brava soldato Ŝvejk". Aliflanke prahanoj, vizitintaj polan urbon Bystrzyca, povis viziti ĝian interesan ĉiraŭaĵon kun multaj fame konataj banlokoj, trinki la sanigan akvon en tre simpatia Polanica-Zdrój, admiri naturbelaĵojn en montaro Gory Stolowe, ĝui la agrablecon de Miedzygórze, bani sin en lago Otmuchow, viziti la fortikaĵon en Klodsko kun tre longaj subteraj koridoroj, bazilikon en Wambierzyce ktp.

Sed neniu el vi, karaj legantoj, malfruis la okazon, ĉar en Bystrzyca estas multaj esperantistoj kaj ilia nombro konstante kreskas agorde kun novaj kaj novaj E-kursoj. La vojaĝo al Pollando estas tre facila, ĉar ĉiuj menciitaj lokoj situas en turisma regiono Klodsko. Necesa permesilo estas ricevebla dum kelkaj tagoj kaj kostas nur kvin kronojn. Praktiku! Kelkaj prahanoj, oficiale invititaj de polaj amikoj, uzis jam okazon kaj vizitis polan maron, Varsoviajn, Vroclavon kaj aliajn urbojn.

La kunlaboron inter Praha kaj Bystrzyca oni povas ĉiuflanke intensigi. Dum Esperanto-kunvenoj de bystrzycanoj estis jam plurfoje komune legata nia "Informa Bulteno". Polaj samideanoj tre bone scias pri ekzisto kaj laboro de Esperantista klubo en Praha kaj ĉiam estas pretaj kunlabori. Tiu ĉi kunlaboro tre helpas al plua proksimiĝo de ambaŭ niaj frataj nacioj kaj ĝi estas ankaŭ modesta kontribuo al moderna devizo de esperantistoj: "ESPERANTO EN PRAKTIKON!"

Josef Forman

Nia membro, unu el la fondintoj de "I.B." kaj ĝia longjara ĉefredaktoro, fama preleganto
s-ano Josef V Í T E K,

vivanta nun en Mělník, festis ĉi-somere sian 53-an naskiĝtagon.

Kara Joĉjo, permesu al ni, ke ni ĉiuj deziru al Vi sanon kaj personajn kaj laborajn sukcesojn.


Viaj "EKP" Geaŭskultantoj "I.B."

La UNUA ESPERANTISTA KLUBO en Germana Demokrata Respubliko konstituiis en Radebeul apud Dresden. Ĝia nomo estas "Laborunuiĝo de popolamikeco per Esperanto". La kunvenoj okazas ĉiun lastan vendredon en kulturdomo de la "Arzneimittelwerke Dresden" en Radebeul. Ni sincere ĝojas pri tiu ĉi fakto, kaj al la nova Esperantista klubo deziras multajn sukcesojn en ĝia laboro.

EL NOTLIBRO DE LA REPORTERO

En la tagoj de la 5-a ĝis la 9-a de ĵulio okazis en sudhungara banloko Gyula jam la III-a Somera Esperanto-Universitato. Ĝin partoprenis preskaŭ 120 esperantistoj el popoldemokrataj respublikoj. La solenan inaŭguron partoprenis kaj ankaŭ salutis "paĉjo" de hungara esperantista movado, verkisto s-ano Julio Baghy. Nivelo de prelegoj estis tre alta kaj interesa. Krom aliaj prelegis iama sekretario de Georgi Dimitrov, s-ano Asen Grigorov, pri bugara folkloro, jugoslava s-ano inĝ. Ludoviko Szekeres pri katastrofa tertremo en Skoplje, s-anino Borbala T. Szeremi pri virinoj en hungara nacia evoluo, s-ano d-ro Bálint Szemenyei pri juristaj problemoj de geedzeco kaj aliaj samideanoj prelegis pri diversaj interesaj aferoj. La Universitato estis sub aŭspicio de urba nacia komitato kaj ĝi estis bonee organizita. Ĉiuj esperantistoj, kiuj ĝin partoprenis, estis tute kontentaj kaj venontjare certe partoprenos aliaj, kiujn en Gyula oni kore bonvenigos.

Ie sur la vasta oceano fiere tranĉadas majestajn ondojn de la profunda marakvo granda marŝipo, kiu havas la nomon de la aŭtoro de la internacia lingvo: ZAMENHOF. Tiu oceana ŝipo havas internacian karakteron ne nur tial, ke ĝi surportas la nomon de la aŭtoro de la internacia lingvo, sed ĉar ĝi "naskiĝis" en Jugoslavio kaj estas pola marŝipo, kiu trafikas tra oceanoj inter multaj landoj de la mondo, sed precipe tial, ĉar ĝia nomo "Zamenhof" simbolas la ideon de interkompreno de la diverslingvaj homoj, servante tiamaniere al paco.



En la lasta tempo "naskiĝis" en Hungario, en la ŝipfarejo Balatonfired, frateto de la unua pola Esperanto-ŝipo. Ankaŭ tiu ĉi hungara ŝipeto volas sekvi la ekzemplon de sia granda pola frato, surportante la nomon de la internacia lingvo - Esperanto. Kaj ĝian internacian karakteron subtenas tiu fakto, ke baptpatrino de la nova hungara ŝipo estis ĉeĥoslovaka esperantistino Soňa Hodková, kiu baptis la ŝipon okaze de la III-a Somera Esperanto Universitato en Gyula je la nomo "ESPERANTO".

La solenan okazaĵon partoprenis delegitoj el ĉiuj landoj, kiuj partoprenis la Universitaton kaj post la bapto ili partoprenis ankaŭ unuhoran ŝipveturadon per "Esperanto" sur la rivero Koros.

En tiuj ĉi tagoj vojaĝis tra Praha 120-membra sudhungara folkloro ansamblo de kantoj kaj dancoj, kiu havas nomon de sia samlandano, komponisto Ferenc Erkel. La ansamblo havas hejmon en sudhungara banloka urbeto Gyula, kie Ferenc Erkel naskiĝis. Hungaraj dancistoj kaj kantistoj revenis el pola Lublin, kien ili estis invititaj de tiea Universitaga folkloro ansamblo, kiu en aŭgusto ĉ.j. estis gasto en Gyula kaj prezentis tie sian programon. En amikaj rilatoj kantis pola ansamblo okaze de sia prezentado en Hungario ankaŭ kelkajn hungarajn kantojn en hungara lingvo, kio havis en Gyula grandan sukceson kaj hungaraj gekolegoj ripetis similan programon al poloj ankaŭ pere de prezentado de kelkaj polaj kantoj en pola lingvo.

Revojaĝante el Pollando, hungara ansamblo eluzis kelkhoran paŭzon en Praha, por vidi la kastelon Hradčany, Malgrandan kvartalon kaj historiajn memorindaĵojn en Malnova Urbo.

La ansamblon akompanis eminentaj esperantistoj de Gyula: Imré Kadár kaj prezidanto de nacia urba komitato, kamarado Enyedi G. Sándor.

Tra Praha akompanis hungarajn gastojn redaktorino de Radio-Praha Soňa Hodková.

La Ŝtona floro de vastaj ebenoj

Motto:

Ĝi estas kiel ama suspiro, kiam suda vento traflugante regionon kiel manplato, ektuŝegos floron, elkreskitan sur ĝia periferio, ie en la loko de la monteto de Venuso. Ĉe la fino de mez-epokoĝ tusegis la fortajn murgeojn de la fortikigita urbo, kiuj fermis la floron ĝis sufokiĝo... Hodiaŭ apogas sin la vento kontraŭ florkalikoj, kiuj sencese diskreskas kaj floras tiel, kiel nun floras la urbo, kiun hodiaŭ ni nomas Olomouc...

Alois Rečka

Meze de fruktodona moravia ebenaĵo Haná, kie la rivero Morava ĉirkaŭfluas rokegojn, elstaras kontraŭ la ĉielo turoj de urbo. Kiu kaj kiam fondis originan loĝlokon ĉi tie, ĝis hodiaŭ historio ne klarigis al ni. Kelkaj romantikaj historiistoj eĉ opiniis, ke la urbon Olomouc fondis mem la komandanto de romaj legioj Gajus Julius Caesar. En spaco, kie hodiaŭ staras katedralo de Sta Venceslao, estas postrestoj de iama kastelo, de ĉeĥaj princoj kaj reĝoj. En unu ĝis hodiaŭ konservita koridoro estis, mortigita la lasta vira posteulo de ĉeĥa rega gento de Přemyslidoj, reĝo Venceslao la Tria, kiam li en la jaro 1306 gvidis armeon al Pollando.

Ĉi tie konstruis domojn nobelaro, kaj ekleziaro; pli poste ankaŭ burĝero. Pli multo de tiuj konstruaĵoj, precipe la urbodomo, preĝejoj de Sta Mauricio kaj de Sta Michaelo, kelkaj burgaj domoj, same kiel mallarĝaj kaj zigzagaj stratetoj en centro de la urbo, ĝis hodiaŭa tempo konservis sian antikvan krakteron. Ili estis atestantoj de riĉeco kaj mizero, gloro kaj sufero de tiu ĉi urbo, havinta gravan signifon en nia historio. Tiun ĉi fakton subtenas ankaŭ la cirkonstanco, ke fine de la 15-a jarcento havis Praha nur unu trionon da logantoj pli ol Olomouc. Tiam bonege prosperanta komerco, ĉefepiskopejo, koncentrigo de eklezia kaj burĝa posedaĵoj, allogadis ĉiujn, kiuj sopiris fariĝi "potenculoj de tiu ĉi mondo". Tial sveda generalo tre detruis la urbon. El la 30.000 loĝantoj restis post sveda okupado nur 2.000 mizerigitaj homoj. Tiuj ĉi plej mizeraj jaroj de Olomouc-a historio restis ne nur en kronikoj. Antaŭ kelkaj jaroj ili inspiris poeton verki parafrazon al unu el multaj etaj homaj tragedioj, 8 tiam okazintaj, kiu portas la titolon "Fontanoj de Olomouc".

Inter memorindaĵoj kaj artaj objektoj en Olomouc estas ses barokstilaj akvofontanoj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ ornamas urboplacojn. Ĉiuj statuoj sur la fontanoj prezentas heroojn el roma mitologio, kvankam ili estis verkitaj en periodo de kontraŭreformacio kaj kulminanta baroktempo, kiam estis preferataj religiaj motivoj. Artistojn-aŭtorojn de tiuj ŝtonjuveloj influis humanistaj historiistoj per sia fabela opinio, ke la urbon fondis romanoj. La skulptaĵoj estas nura kompletigo de la fontanoj, ĉefan taskon havas akvo, kiu larĝe fluas kaj, ŝprucas el la statuoj kaj kreas en ĉirkaŭaĵo de la fontanoj specialan poezian medion. Post finkonstruo de akvokondukilo en la urbo perdis la fontanoj sian rolon kaj ili estis malkonstruataj kaj forigataj. En Olomouc oni trovis trinkeblan akvon por akvokondukilo nur en la jaro 1887, tial el de tiu jaro servis la fontanoj nur kiel kontraŭincendiaj akvorezervujoj kaj tio ebligis, ke la belegaj fontanoj restis konservitaj ĝis hodiaŭ. Al barokstilaj memoraĵoj apartenas ankaŭ du belegaj statuo-grupoj de Sta Triunuo kaj kolono de Sta Mario.

Dum la regado de imperiestrino Maria Teresia fariĝis Olomouc grava strategia fortikaĵo kontraŭ la prusaj armeoj de Frederiko de Granda, kiu dum sia ekspansio sopiris okupi ĉeĥan kaj moravian teritoriojn. Ironio estas, ke la fortikaĵo alservis al viena imperiestra korto nur kiel rifuĝejo antaŭ epidemio de variolo. Inter la fuĝantoj el Vieno estis ankaŭ, tiam 11-jara, W. A. Mozart, kiu dum sia restado en Olomouc komponis la 6-an simfonion.

Kazematoj de tiu ĉi fortikaĵo post perdo de strategia militista signifo, estis uzitaj kiel malliberejo. Ĉi tie estis malliberigita generalo Lafayette, heroo de bataloj pro sendependeco de Ameriko. Kvindek jarojn poste estis ĉi tie arestitaj patriotoj, kiuj batlis en la jaro 1848 sur barikadoj en Praha.

Muroj de la fortikaĵo, destinitaj por defendo de la urbo, malhelpis ĝian disvolviĝon. Malgraŭ tio, ke fine de la pasinta jarcento estis muroj de la fortikaĵo parte detruitaj, por ebligi disvolviĝon de la urbo, tamen Olomouc restis por longa tempo nur garnizona urbo. Interterpe de du mondmilitoj oni komencis malrapide la urbon pligrandigi kaj fondiĝi industrion. Post la dua mondmilito estis en Olomouc restarigita universitato, fondita ne nur industrio de nutraĵoj, sed ankaŭ maŝinindustrio. En urbaj periferioj oni konstruis modernajn loĝkvartalojn.

Malnovaj kvartaloj de la urbo, precipe ĝia centro, kiu estas en Moravio la Plej historia, servas nun kiel memoraĵrezervejo kaj celo de miloj da turistoj, ne nur el Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ el eksterlando.

S.H.

+/ La poemo de Alois Rečka "Fontanoj de Olomouc" estas presita sur la p.10

LA 5-an KAJ LA 6-an DE SEPTEMBRO 1964 OKAZIS ESPERANTISTA KONFERENCO EN OLOMOUC

Kiel delegito de Esperantista klubo en Praha partoprenis ĝin samideanino Hodková. La Konferenco komenciĝis la 5-an de septembro en Distrikta domo de pioniroj per arnika kultura vespero kun danco. La laborparto okazis dimanĉe la 6-an de septembro en salonego de Patrujsciencia muzeo en Olomouc. Inaŭguris ĝin prezidanto de la Esperantista klubo en Olomouc s-ano D-ro Vladimír Mohapl, kiu bonvenigis inter aliaj ankaŭ gastojn el Indonezio, Hungario kaj Pollando. Ĉefpreleginto estis s-ano Kočvara el Ostrava. S-anino Milatová, kiu partoprenis la UK en Hago, komparis tiun ĉi Kongreson kun la Kongresoj en Varsovio kaj Sofio, kiujn ŝi ankaŭ partoprenis. Varsovio kaj Sofio preskaŭ vivis per la Kongresoj, ĉiuloke estis amaso da esperantistaj flagoj kaj propagandiloj, kontraŭ tio en Hago eĉ policistoj ne sciis, ke ĉi tie okazis iu ajn kongreso.

La Konferencon salutis ankaŭ gesamideanoj el Česká Třebová, Frýdek, Gottwaldov, Havířov, Opava, Praha, Šternberk kaj Šumperk. La Konferenco estis fermita per esperantista himno, kiun orgenludis koncertmajstro, s-ano Stanislav Vrbík. Posttagmeze vizitis partoprenintoj de la Konferenco Tutŝtatan ekspozicion de ĝardenkulturo en Smetana-parko.

ALOIS REČKA:
FONTANOJ DE OLOMOUC

La roso de la poezio ekfloras eĉ meze de ŝtonaj floraĵoj, fontas el kalikoj ondigitaj per skulptista cizilo, el kalikoj de fontanoj de Olomouc ...

Eble ducent jaroj, eble pli vipis iliajn vizaĝojn antaŭ ol ilia ensorĉiĝo cedis al retajoj de fantazio, kiuj retkaptis... kaj ĝi estas atesto de sindono kaj amo de tiu tempo, kiam la urbon stringis kiraso de malpacaĵoj, regateco kaj potenco. Kiel kortuŝa estas trista historio de gemantoj, kia juĝanto de kugloj, kiuj amon pereigas...

A u d u . . .

Am' mia estas
kiel moner' ĵetita for
en fontano di Trevi.
Amat', ĉu scias ne vi,
ke gem' droninta en larmar'
ne povas sin relevi?

Atendas mi en ombro de fontan'

Per grinca paŝo
al urb' sin ŝtelas noktomez'
kiel murdist' aŭ fremda ombro.
Horloĝon pikponardis temp'
kaj ĝi kun korva kriĉo
jam batas, batas je alarm'.
Ah, koron kaŝi malfacil',
sopir' se estas kaj la am'

ektremas l'ombro nur en gut-sinkaĵ',
ŝtona rideto de l'Tritona rikan'
el akonito estas, elkoni trinkaĵ'.

Kaj eble venis li
dum mi pli fore gapis,
ne vidis eble min amat'-
mi kion diru, ja se ŝtorm'
de lipoj ruĝon rabis
kaj mi al tempo timas diri: halt'!

Fontano larma, vasko de l'Triton',
donu al vi moneron de la am' unua,
aŭdu al mia plor'
kaj min ne traktu fremde.
Lin, kiu dotis vin per belo skua,
ja pelis homa kor'.

Fontano ploru, ploru nur,
sopiron mian lavu via duŝ'.
Temp' en horloĝ-kordujon batis,
mallum' ektremas,
kaj la knabino tremas,
kaj foliaro tremas,
dum manoj preĝlevas vento
sur dorsoj de tegmentoj.

portataj for sur ĉerkportil'.

Indas ke amu oni...?
aŭ amon malbezoni?
Mia brakumo, kein vin doni!
Kien vin kaŝi, se ĉiu rimarkas,
mia amato ke al mi mankas,
aĥ mia sino, vin kein doni?

Aĥ mia koro
kien celas ilo,
vi ne eskapos de sopiro!
Ĉe la fontan' knabino staras, staras...

Trompas ŝin ombra artifiko,
nokt' ventkombile harojn kombas.
Kaj kiel vent'karesas ŝin,
alia kisas fore sub lariko
en pafkrakada fajroglim'
la mortan ombron – karan lin.

Ho gutoj, gutoj, falu tra silento
finspiras unu sopir' kaj unu amsento...

Tradukis:
Jiří Kořínek - 1957

Esperantistoj de Olomouc dissendis en la mondon tradukon de "Fontanoj de Olomouc", kiun faris s-ano Jiří Kořínek el Brno kaj pri kiu la aŭtoro mem diris, ke Kořínek pliverkis tion, kion li mem "restis ŝulda al fontanoj".

La poemo tre plaĉis kaj pere de Esperanto ĝi estis tradukita en kelkajn naciajn lingvojn.

Hodiaŭ ekzistas jam tradukoj: hispanaj de s-ano Francisco Azorin el Meksikio kaj de s-ano Valdo E. Pons el Urugvajo: itala de s-ano Luigi Minnaja, hungara de s-ano D-ro Bálint Szemenyei, dana de s-ano Albert Holst, norvega de s-ano Henri Fridén kaj germana de s-ano Leo Jolliet el Wiesbaden.

MI AMAS VIN ROS'MARI'...

Kiu ne konus melodiojn el mondkonata opereto de Rudolf Friml "Rose Marie"? Sed ĉu vi scias, ke ĝia aŭtoro naskiĝis en Bohemio kaj ke lia vivo estas preskaŭ romano?

Ni renkontiĝis kun li en pitoreska gastejo "Ĉe Ora Tigro" okaze de lia ĉi-jara vizito en Praha kaj lia amiko, majstro Rudolf Deyl, sen., portanto de Ordeno de laboro, rakontis al ni ... "Ĉi-jare preparis Praha nove aranĝitan premieron de fama opereto "Rose Marie" okaze de la okdekkvina, vivjbleo de ĝia aŭtoro. Li naskiĝis en Praha kaj li estas unu el la lastaj studentoj ĉe fama bohema komponisto Antonín Dvořák. Kiam Friml finstudis konservatorion, la tiama baletmajstro de Nacia Teatro Aŭgustin Berger hazarde bezonis pianiston, tial li petis de Friml kunlaboron. Ilia kunlaboro harmoniis bonege.

En majo 1899 preparis la teatro opereton de Sullivan "Gejŝo". Berger volis la opereton pliriĉigi per danca sceno, en finalludo, kiun la aŭtoro forgesis komponi. Dum unu dancprovo

Friml improvizis kaj tiu ĉi improvizaĵo estis la dezirata muzikverko, kaj poste la tutvespera baletoj "Danco de krizantemoj", kiu havis grandan sukceson ankaŭ en eksterlando.

En la jaro 1901 akompanis Friml la gloran violon-virtuozon Jan Kubelík dum lia transmara rondvojaĝo. Reveninte al Praha Friml ne plu estis tiu delikatsentema muzikisto.

En Praha li denove renkontiĝis kun Berger, li aranĝis multajn sukcesajn koncertojn en Praha kun sia fratino Zdenka kaj li fariĝis tre populara. Li ricevadis ne nur gratulleterojn, sed ankaŭ leterojn de praha-aj, belulinoj. Dum iu, balo li konatiĝis kun unu el ili, ŝi estis filino de fama komercisto Procházka. Sed la patro stariĝis kontraŭ ilia amo. La geamantoj devis disiĝi kaj Friml metaforis sian kordoloron en belegajn "Kantojn de Závěš", kiujn kun li kantis la tuta Praha. El tiu tempo devenas ankaŭ kelkaj liaj simfonioj kaj baletoj "Heifried", komponita je mondo de teatro en Leipzig. El ĝi ni konas la ĉarman "Dancon de gemoj". Oni promesis al Friml nostenon de orkestrestro en kelkaj teatroj, sed finfine restis al Friml nup tiuj promesoj.

Li decidiĝis forlasi la patrujon, denove hazarde helpis al li Berger kaj vojaĝon al Usono ebligis al Friml sinjorino Schrimmer el Dresden, kiu rekomendis lin al sia filo vivanta en Nov-Jorko. Friml per siaj indianaj kantoj fariĝis en Usono baldaŭ konata, malgraŭ ke li havis grandan konkuranton en la persono de Irving Berlin.

En korojn de ĉiuj amerikanoj enskribis sin Friml per siaj operetoj "Reĝo de vagabondoj" kaj ankaŭ ĉio per "Rose Marie" kaj ankaŭ kiel komponisto de muziko por la filmo "Neĝulino kaj sep koboldoj".

Nu, kaj hodiaŭ li estas inter ni. Per la renovigita premero de "Rose Marie" certe preparis Praha al li belan donacon, kaj ni deziras al li en venontajn jarojn multe da sano, ĉar li vere ne aspektas kiel okdekkvinjarulo, ĉu?" - finas majstro Deyl.

La gazeto Večerní Praha alportis la 13-an de oktobro en unu el siaj artikoloj informon, ke la kolektivo de la Teatro de S. K. Neumann /el Praha/ prezentos en la pola urbo Lódž 3 prezentaĵojn de la teatraĵo de Edward Albee "Kiu havus timon antaŭ Kafka" kaj ke rekompence la teatra kolektivo el Lódž konatigos teatran publikon en Praha kun la teatraĵo de S. Winzelberg "Kataki", kaj ke unu el tiuj ĉi polaj prezentaĵoj efektiviĝos en Esperanto.

Tiun ĉi fakton, kiu nin ĝojigas, eluzos niaj geklubanoj, kaj ili amage vizitos la esperantlingvan prezentĵon. Interesuloj turnu vin al nia vic-prezidanto, s-ano A. Slanina, kiu prizorgos enirbiletojn.

En VIENO komenciĝos la 11-an de julio 1965 la EŬROPA ESPERANTO-KONFERENCO 1965 kies devizo estas:

ESPERANTO en la praktikon

Laŭ la "Unua Oficiala Bulteno" kaj laŭ la alveninta cirkulero aliĝis jam gesamideanoj el Anglujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Italujo, Jugoslavio, Nederlando kaj Pollando, kiuj konferencoj pri Esperanto en komerco kaj industrio pri Esperanto en turismo kaj pri lingvaj problemoj en internacia politiko.

En la cetera programo preparis la organiza komitato belajn ekskursojn tra Aŭstrujo /al Semmering, al Rax-Alpo, al Lago de Neusiedl, tuttagan ŝipekskurson ktp./ kaj kompreneble ĝi ne forgesis Vieno-n.

Do krom partopreno de la labora E-programo konatiĝos la partoprenantoj kun vidindaĵoj de Aŭstrujo kaj de ĝia ĉefurbo, kies urbestro estas entuziasma esperantisto.

Kaj vi, kiuj vojaĝos al Vieno aŭ poste el Vieno, eluzu la eblecon kaj vizitu najbaran Ĉeĥoslovakion, kiu en la jaro 1965 festos la 20-an datrevenon de liberigo de nazi-okupado.

Ĉeĥoslovakaj esperantistoj elkore invitas vin. Kaj kion vi vizitu en Ĉeĥoslovakio.

Jen kelkaj niaj rekomendoj. En Slovakio la Tatra-montaron, kastelojn kaj kastelfortikĵojn, admiru folkloron kaj industrian progreson; en Moravio vizitu Brno, la urbon de Internaciaj foiregoj, la arkeologian trezorejon Mikulčice, Olomouc, la urbon de Tutŝtataj florekspozicioj kaj la mondkonatan moravian karston. En Bohemio estas por vi paletro de naturbelecoj de Ŝumava kun profundaj arbaroj, Suda Bohemio kun fiŝlagoj, en norda parto ĝardeno de Bohemio kun fantazie belegaj vulkanmontoj. Kompreneble vi ne forgesos viziti Praha, de kie vi aviadile atingos dum 25 minutoj centron de okcidentbohemiaj banlokoj - Karlovy Vary.

Tial, karaj gesamideanoj, via vojo al aŭ el la Eŭropa Esperanto - Konferenco en Vieno celu al vizito de Ĉeĥoslovakio.

Vizito de Ĉeĥoslovakio restos por vi neforgesebla travivaĵo kaj vi certe denove elektos Ĉeĥoslovakion kiel landon de via libertempo.

Do, ĝis la revido en Ĉeĥoslovakio!

En sudhungara urbeto Totkomoloŝ konsistas la duono de loĝantaro el slovakaj minoritato. Slovakaj samlandanoj estis ĉi tien translokitaj el siaj naskiĝvilaĝoj de feŭdala hungara nobelaro eble antaŭ 200 jaroj. Ili konservis ĝis hodiaŭ siajn _naciajn kutimojn kaj lingvon. Hodiaŭ ili havas en Totkomoloŝ ankaŭ slovakajn lernejojn. Plejparte ili estas terkulturistoj kaj ĝardenistoj organizitaj en kooperativo. Ili sukcese kulfcuras bonegan hungaran kapsikon kaj dank' al modrnece kaj teknike ekipitaj vitrodomoj ili atingis du rikoltojn po jare. Niaj samlandanoj havas Esperanto-rondeton, kiu vikle vivas.

RADIO-ROMA elsendas en Esperanto ĉiun mardon, merkredon kaj vendredon de la 18.55 ĝis la 19.10 horoj laŭ MET. Ondlongoj: 31,33;41,24 kaj 50,34 metroj. Prelegantoj: Marde kaj merkrede s-ro Luigi Minnaja. Vehdrede prof. D-ro Vincenzo Musella. Riĉega programo de prelegoj ĝis fino de nunjara aŭgusto estis dissendita. La geaŭskultantoj ne forgesu informi la stacion pri via aŭskultado.

OPEROJ EN ESPERANTO

En la angla gazeto "The Scotsman" aperis la 11-an de septembro 1964 artikolo de s-ro Robert Mi partoprenis sukcese nia Nacia teatro.

La aŭtoro i.a. skribas, ke multaj ĉeĥaj operoj estis tradukitaj en Esperanton kaj li kunsentas kun direktoro de Nacia teatro s-ro Prokoš, ke Esperanto kapablas precizajn tradukojn kaj ke ĝi havas por la kantistoj eminentajn kantkvalitojn. S-ro Mackay rekomendas, ke oni kantu operojn en Esperanto ankaŭ pro tio, ke nur malmultaj aŭskultantoj komprenas la tekston, se ĝi estas kantata en originala lingvo.

Sut la bildo vi vidas la delegitaron de Nacia teatro dum solena akcepto ĉe lordo Provost Duncan N. Weatherstone, urbestro de Edinburgh. La delegitaro transdonis al li la mesaĝon de la ĉefurbestro de nia ĉefurbo Praha Ludvík Černý kaj donacon de Nacia teatro - facetitan vazon. /La tria de maldekstre estas lordo Provost Duncan N. Weatherstone kaj la dua de dekstre estas la direktoro de Nacia teatro Bedřich Prokoš./



...kiel antaŭ 350 jaroj

Al ĉiu, kiu vizitis nian ĉefurbon Praha kaj kiu el la ponto de Karolo la Kvara admiris la panoramon de la reĝa kastelo Hradčany, certe fiksiĝos en memoro la insuleto Kampa; unu el la plej pentrindaj anguloj, kiujn havas la ĉeĥoslovaka ĉefurbo.

Unu bordon de Kampa formas rivereto Čertovka, kiu verdire estas riverbrako de Vltava. Ĝi rapidfluas inter domoj, kiuj speguliĝas sur ĝia nivelo kaj kies dorsenirejoj kondukas per siaj ŝtuparoj al Vltava. Tial oni nomas tiun ĉi parton de Praha „Venecio en Praha“.

De la ponto oni iras al Kampa tra ŝtona ŝtuparo kaj oni venas al malgranda placo, kiun ĉirkaŭas la barokstilaj domoj. Ĉi tie printempe kaj aŭtune ĝis Kristnasko ĉiam okazis grandaj potofiroj. Ĉi tie amasiĝis manufakturistoj de argilaj ujoj el Praha kaj provinco, por ĉi tie vendi siajn artiklojn. Sur koniferaj branĉoj, sur pajlo, sub veturilaj ŝirmtukoj kaj en lignaj budoj ili vendadis potojn, kruĉojn, bakpatojn kaj vazojn. Tiu ĉi varo la unuan fojon estis ĉi tie vendata en la jaro 1606, kiam la urba konsilantaro permesis al provincaj manufakturistoj venadon de varoj en la urbo. Ek de tiu jaro okazis la foiroj regule ĉiujare preskaŭ dum 350 jaroj. Nur antaŭ kelkaj jaroj ilia glora kaj interesa tradicio eksilentis. La placo sur robinioj orfiĝis.

Ĉi-jara aŭtuno rememorigas la estintan gloron de Kampa – de ĝiaj potofiroj. En modernaj foir-tendoj reviviĝas la tradicio kaj ĝi dokumentas maturan nivelon de samtempa ĉeĥoslovaka ceramiko.

La revenon de foiroj en pentrindan malnov-praha-an solejon la prahanoj bonvenigis kaj kun ili miloj da eksterlandaj turistoj, kiuj tie nun aĉetadas, rememore al Praha, belajn ceramikaĵojn.

S.H.

LA POSTKONGRESO EN LEEURWARDEN de la 9-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1964

Tiu ĉi Postkongreso, kiel daŭrigo de la 49-a Internacia Esperanto-Kongreso en Hago, okazis en frislanda cefurbo. Ĉeestis tie ĉirkaŭ 200 personoj de 23 diverslandoj. La ĉefa celo de tiu ĉi Postkongreso estis konatigi la partoprenintojn kun frislanda provinco kaj ĝia popolo, kun ĝia freŝa, floranta beleco kaj kun ĝia kulturo. La organizintoj mirinde sukcesis krei amikan, ĝojan atmosferon. Neniu devis koleri je io ajn, neniu laciĝis pro tro granda streĉo, ĉio iris glate kaj facile. La belega ŝipekskurso sur la frisaj lagoj, la tuttaga veturado per autobuso tra sudokcidenta parto de la provinco, la solena akcepto en la kie post esperantlingva parolado de la urbestro sekvis la bankedo. Tio ĉi helpis



De maldekstre: S-ro H.W. Holmes, la honora prezidanto de UEA kun la edzino, Ĉe-instruisto Sipke STUIT el Francujo kaj s-ino Y. Bartošíková.

al pli bona kompreniĝo inter la gastempaj frilandanoj kaj la gastoj, kaj tio ĉio postlasis ĉe ni – feliĉaj ĉeestintoj – neforgeseblan impreson pri vera esperantista vivo, kie la homoj, parolantaj unu saman lingvon sentas sin anoj de unu granda rondo familia.

T. Bartošíková

PRI JAN AMOS KOMENSKÝ „Instruisto de popoloj“

ekzistas multegaj verkoj, mujte oni skribis pri li, sed ĝis hodiaŭ estas nerispondita demando, kie J. A. Komenský naskiĝis. Tri urbetoj - Komňa, Nivnice kaj Uherský Brod - aspiras esti lia naskiĝloko.

Multaj sciencistoj-fakuloj okupiĝis pri tiu ĉi temo kaj nun ŝajnas la problemo esti solvita. Licenciato A. Skarka ricevis de s-ino M. Blekastad el Oslo kelkajn fragmentojn de Komen- ský-verko "Clamores Eliae" /"Lamentado de Elio"/. En unu ĝia parto, kiu havas la titolon "Panorthosia patriae" /"La plenreformo de patrujo"/ estis trovita omaĝo skribita plej-verŝajne en la unua krea emocio, kiam Komenský tro taksis siajn realajn eblecojn kaj laborfortojn. La omaĝo komenciĝas: "Al amata patrino, mia patrujo lando moravia, unu el fidelaj filoj ĝiaj... Jan Amos" /li komencis skribi, sed tuj li trastrekis "Ko- t. e. nefinskribita Komenský/ Seges Nivnicensis, laŭ patro nomita Komenský...

La manuskripto, kontinuo kaj la fakto, ke la verko estis gkribita antaŭ la fino de lia vivo ŝajnas dokumenti, ke en tiu ĉi omaĝo Komenský rememoris sian naskiĝlokon. Eble ĝi estas atesto pri lia profunda kaj dankoplena amo al lia naskiĝlando, k iun lia koro neniam forgesis.

Rf

Rim.: Al tiu ĉi anonco nia redakcio ankoraŭ revenos tuj kiam oni Oficiale publikigos pliajn detalaĵojn.

ĈU GORDIA NODO EL KOLORAJ GRAFITOJ?

En la 2-a /1963/ numero de "I.B." ni alportis sur la tria paĝo mallongan informon pri koloraj grafitoj por metalaj skribiloj, kiuj en tropikaj landoj moligis tiel, ke oni povis el ili ligi nodon.

Tiujn spertojn havis ĉeĥoslovakaj geologoj ekzemple en Vjetnama Demokrata Respubliko.

Nun ni eksciis el krajonfabriko Hartmuth en České Budějovice, ke ĝiaj laboratoriaj spertuloj la aferon sovis. Grafitformoj estis rekonstruitaj kaj modernigitaj. Grafitoj eatas nun altkvalitaj kaj nun jam ne eblas ligi el ili nodon nek en tropikaj landoj nek en pli malfavoraj artefaritaj kondiĉoj en laboratorio de la krajon-fabriko. /

La informon sendis al ni ĉefredaktoro de la revuo "Geologia esplorado" Jaroslav Štěpánek, portanto de la Ordeno por eminenta laboro.

INTERNACIA VINTRA FERIO-SEMAJNO

Studenta Tutmonda Esperantista Ligo aranĝos de la 26-a de decembro 1964 ĝis la 3-a de januaro 1965 Internacian Vintran Ferio-Semajnon en Zakopané /Pollando/,

En la programo estos interkonatiĝa vespero, ekskursoj, prelegoj, diskutoj, artprogramoj, por skiamantoj oni aranĝos specialajn skisportajn prograĵojn.

Informj: F. Simonnet, 16, rue Dohis, Vincennes /Seine/, Francio.

S-ano Slanina, konata reĝisoro de multaj teatraĵoj prezentitaj en Esperanto, informis nin dum nia kunveno la 16-an de oktobro, ke li intencas en venonta jaro reĝisoradi konatan teatraĵon "Manon Lescaut" en brila espeantlingva traduko de s-ano Jiří Kořínek. Rolos profesiaj aktoroj el Praha.

Korespondanto

Bulgario

" ZORKA TOMOVA PETROVA, str. "Krastju Gerasov" 15, Ruse, Bulgario, 28-jara; " VELIČKA TATAROVA, str. "Kavala" 2, Ruse, Bulgario, 25-jara:

" KALINKA GENOVSKA, str. "Skoelev" 60/ I, Ruse, Bulgario, 28-jara postoficisto deziras korespondi per bildkartoj, leteroj, interŝanĝi fotojn kun ĉeĥoslovakio, Italio, Svislando, Francio, Anglio kaj Usono.

ĉeĥoslovakio:

" JARMILA SVOBODOVÁ, Vrchlického 19, Teplice v C, ĈSSR, deziras korespondi kun ĉ. 1. pri diversaj temoj.

Germanio /Orienta/ :

-" ERICH-DIETER KRAUSE, Riemannstr.10, Leipzig C lx GDR, deziras interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn, kvanto kontraŭ kvanto. Respondo tutcerta.


Hungario:

" JULIO ULM, Medve-u.15,I.,10,Budapest II.,Hungario,51-jara teknikisto deziras korespondi kun iu praha-ano pri turistiko.

Pollando :

" Mrg STEFAN FLORCZIK, ul.gen.Berná 24, Krakowjdezirag korespondi pri balkana historio kaj gijaj problemoj.

" GEORGO DVORAK, str.Bugajska 28,Pig- trków Fryb, Pollando. instruisto.serĉas samprofesiulojn por korespondi kun ili pri problemoj de edukado.



Sur la lasta paĝo: Nacia teatro en Praha.

"INFORMA BULTENO" de Esperantista klubo en Praha - fakrondeto ĉe Obvodní kulturní dům ONV 1, Praha 1. Respondeca: Miloš Rudolf. Teknika redakcio: VI.Pražák. Lingva redakcio: A. Slanina. Aperas laŭbezzone.

Adreso:"ESPERANTO"P.B.1108, Praha 1. Ĉeĥoslovakio. Ĉiuvendrede de la 20-a ĝis la 22-a hord telefonu: 22 65 14.

ST 119, 689/64